

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. N°10



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №10 (288)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 65-66.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №10 (288).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 5 октября 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Edmond Privat. Esperantismo kaj novaj ŝtatoj	6
Eventoj	8
Carlos Pesquera Alonso. IJK: Varmo, junuloj kaj Esperanto	9
Bert Schumann. Infana-adoleskanta Kongreseto en 2018	11
Lu Wunsch-Rolshoven. Arkones sen Paweł	13
Ilona Koutny, Katalin Kováts. UAM, la septembra sesio	14
Tiina Oittinen. Du eventoj en la kongresurbo 2019	15
Francesco Fagnani. Itala kongreso en San-Marino	16
Miguel Bento. Verda Kafo 40-jariĝis!	17
Estraro de KarEJO. Raporto pri VINA	19
Andrzej Bach. Viziti geamikojn	20
Ben Indestegé. Benelukse kun kvaropa <i>Kajto</i>	21
Werner Pfennig. La kvardekjara SEFT	21
Ineke Emmelkamp. Festi vian lingvon en libera ŝtato	22
Jindřiška Drahotová. Denove en la Ĉeĥa Paradizo	23
Pavla Dvořáková. Jubilea festo en la Esperanto-Muzeo en Svitavy	24
Oliver Walz. Saarbrücken: Esperanto en Lernado-Festivalo	25
Irina Gončarova, Aleksandr Basov. "Esperanto: la unua kanalo" trijara	26
Povilas Jegorovas, Aleksander Korĵenkov. BET-55: Kontribuoj de Márkus Gábor kaj Lee Jungkee	27
Ronald Schindler. Zamenhoffesto 2018 en Berlino	28
14 elstaraj agantoj diplomitaj en Lisbono	29
Esperanta Vikipedio atingis sian 250-milan artikolon	30
Nekrologoj	31
Koncize (12 informoj)	32
Tribuno	33
Lu Wunsch-Rolshoven. La kerna problemo de UEA	34
Renato Corsetti. UEA revenu al sia centra tasko	34
José Antonio Vergara. Malesperiga manko de kunlaboro	35
Jovana. Nenio pri la vera malsano	35
Dennis Keefe. Pri la strategio de UEA	36
Carlo Minnaja. Ĉu intermalamikiĝo aŭ daŭra agreso?	37
Aleksander Korĵenkov. Kiom da delegitoj?	38
Aleksandr Basov. "Lokalizu": Nova projekto de MEA MASI	39
Annie Grente. Atendante la trian Junularan Renkontiĝon en Kreto	41

Arkivo	42
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2018	43
Bibliografio de Aleksander Korĵenkov (4)	44
Kulturo	50
Fjodor Sologub. Ringego (Trad. el la rusa Denis Martynov).....	51
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Prezento de NDK en Poznano.....	54
Halina Gorecka. Kolekti, konservi kaj disponigi – vera defio por la Esperanto-komunumo (Recenzo: <i>Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredajon</i>)	55
Nikolao Gudskov. Abortita krimhistorio (Recenzo: Julian Modest. <i>Murdo en la parko</i>)..	57
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2018, №31	58
Ricevitaj gazetoj	59
Halina Gorecka. Abonhelpa fonduso de “La Ondo”.....	59
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Novelaro de Brjusov – nova senpaga libro de <i>Sezonoj</i>	60
<i>Literatura Foiro</i> , 2018, №294	60
Mozaiko	61
Viktor Alikin. Krucvortenigmo	62
Germanaj ŝercoj el la 1911a jaro	63
István Ertl. Spiritaj splitoj kaj preskeraroj.....	64
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	65

Kovropaĝo: Grandan sukceson en ĉi-jara ARKONES havis la koncerto *Pacon kune* de korea-litovia muzika kvaropo. (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Esperantismo kaj novaj ŝtatoj

Eble la ĉefa rezultato de la milito estos la renaskiĝo de diversaj ŝtatoj en orienta Eŭropo precize en tiu parto de l' mondo, kie aperis Esperanto. Preskaŭ neniu en Okcidento komprenis kaj antaŭvidis, ke fatale tiu granda skuo devos inciti la multajn gentojn de l' rusa Imperio barakti por regajni ilian antikvan sendependecon. Eĉ hodiaŭ, ekzistas multaj personoj, kiuj volonte diras pri Ukrainio aŭ Litovujo, ke ili ne ekzistas, kaj ĉiu povas vidi, ke politikistoj neantaŭvidemaj laboras ankoraŭ por restarigo de vasta unu Rusujo.

Estas vere, ke tre malmultaj homoj en Okcidento ion aŭdis antaŭ la milito pri la diversaj gentoj, kiuj loĝas sur la grandega teritorio regita de l' caroj. Eĉ en lernejoj, francaj, anglaj kaj germanaj, infanoj ricevis iluziojn pri unueco de l' orienta giganta ŝtato. Inter tiuj, kiuj ne partoprenis tian eraron kaj estis iom pli bone informitaj pri la vera stato de tiuj landoj inter Balta kaj Nigra maroj, oni povas kalkuli la Esperantistojn. Efektive, la tuta predikado de nia dolore bedaŭrata Majstro, D-ro Zamenhof, montris al ni ne nur la diversecon de gentoj pola, hebrea, ukraina, litova, leta, esta, fina, blank-rusa, tatarea, georgia, armena, kirgisa, k. t. p., sed ankaŭ la disputojn kaj ofte malamon, kiuj ekzistas inter ili. Aŭdante la genian parolon de l' amata mortinto estis facile kompreni, kiel fervore li deziris pacigon inter tiuj popoloj.

Cetere listoj de diverslingvaj Esperanto-lernolibroj, legado de naciaj Esperantaj gazetoj kiel *"Pola Esperantisto"*, *"Ukraina Stelo"*, k. t. p., korespondado kun samideanoj de tiuj regionoj konigis al ni la ekziston de tiuj nacioj premataj sub fremda regado.

Kiu el ni ne memoras ankaŭ la indignan proteston de finlanda aŭ pola delegitoj ĉar sekretario de kongreso nia forgesis kalkuli ilian nacion sur la listo de l' parolontoj ĉe l' malferma kunsido?

Tiel, en nia propra Esperantista rondo familia, ni lernis konatiĝi kun tiuj malfeliĉaj popoloj, kiuj ne ĝuas liberan vivadon kaj revis pri malproksima tago de nacia liberiĝo metante sian esperon en la sama stelo, kiu simbolas por ni la tempon de homa refratiĝo. Kun intereso, kun simpatio kaj ankaŭ eble kun iom da skeptika dubo ni sekvis ilian klopodadon por defendi la rajton de iliaj nacioj kaj memori la mondon pri ilia ekzisto. Ĉu kelkaj el la plej belaj tradukaĵoj aperintaj en nia lingvo ne estas efektive literaturaĵoj el tiuj lingvoj, kiujn imperia cenzuro malpermesis en oficialaj lernejoj kvazaŭ oni povus tiel elradikigi el koro de l' homoj la karan hejman parolon lernitan sur genuoj de patrino?

Hodiaŭ, karaj fratoj, ukrainaj, litovaj kaj polaj, vi preskaŭ atingis la unuan celon, la horo de l' liberiĝo subite jen eksonis por vi kiel hela sonorilo inter la dolora bruado de l' milito kaj la frakaso de l' ruiniĝanta imperio. Kun vi ni ĝojas pri via nacia renaskiĝo kaj ni tutkore esperas, ke vi sukcesos starigi viajn ŝtatojn en plena sendependeco je potencaj najbaroj. Se vere povas lumiĝi super viaj kapoj la tiom esperita tago de liberiĝo, al vi el malproksimo ni sendas tutkoran bondeziron kun frata saluto kaj al

vi, kiuj restas ankoraŭ premataj ni sendas esperan senton. Sed la duan, nian komunan celon ni devas nun ĉiuj atingi. Post nacia liberiĝo devos iam veni internacia refratiĝo. Kiel ankoraŭ malproksima ŝajnas tiu tempo! Eĉ inter apenaŭ starigitaj novaj ŝtatoj jam komenciĝas akraj disputoj pri landlimoj kaj teritorio. Imperialismo, avideco kaj maltoleremo jam venenas la sunleviĝon en ĉielo de junaj popoloj.

Al tiaj tendencoj la Esperantistoj devas energie kontraŭbatali. Ni ŝiru la verdan stelon de nia brusto se ni konsentas akcepti patriotismon bazitan sur malamo! Pli ol unu fervora samideano subite fariĝis influa viro kaj politikisto en nova ŝtato de orienta Eŭropo. Ilia Esperantismo kaj la memoro de nia Majstro trudas al tiaj homoj gravan respondecon kaj tre klaran devon. Ĉiuj ni fidas, ke ili donos tutan sian forton por praktike realigi la principojn de Zamenhof en la konstruado de siaj ŝtatoj.

Neniam, kaj speciale ne en orienta Eŭropo, povos landlimoj precipe apartigi la gentojn laŭ lingvo kaj religio. Ĉiam restos polaj kaj hebreaj urboj meze de ukrainaj aŭ litovaj kamparoj. Malsaman lingvon kaj diversan religion havos eterne vilaĝanoj kaj urbanoj de vastaj regionoj. Kiel starigi pacan kunvivadon inter ĉiuj, se ne per plena toleremo kaj per reciproka respekto de ĉiuj gentaj rajtoj. Kiam kaj kie pli profete taŭgas la tuta homa instruado de Zamenhof?

En Svisujo neŭtrala kaj sen teritoria ambicio ni starigis Orientan Komisionon por interkonatiĝo kaj studado de komunaj demandoj inter Poloj, Ukrainoj, Litovoj, Letoj, k. t. p. Ni tutkore dezirus, ke en tiuj landoj disvastiĝu pli kaj pli la ideoj de Esperantismo, t. e. la tendencoj al internacia kunfederiĝo kaj al neŭtraleco. Kompreneble nenio pli helpos tian rezultaton ol propagando de nia lingvo mem. Tial duoble fervore ĉiuj Esperantistoj en orienta Eŭropo laboru por enkonduki Esperanton en la ŝtataj lernejoj. Neniam antaŭe estis la ŝancoj tiel vastaj kaj la eblaj rezultatoj tiel gravaj por tuta homaro.

Edmond Privat.

Esperanto, 1918, №9-10 (217-218), p. 10 (102)

XIV^a jaro. № 217/218 (9/10)

★ Monata ★

Septembro/Oktobro 1918

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

JARA ABONO

Ordinara eldono 5.— Frankoj
 Luksa eldono 6.25 Frankoj
 Svisa poŝtĉeka konto 1.824.— Oni akceptas nur tutjarajn abonojn
 La abonoj komenciĝas de la 1^a de tiu monato

REKLAMO

Reklamo (1 linio aŭ ĝia spaco) 0.50 Frankoj
 Anonceto (1 linio: 10 vortoj) 0.40 Frankoj
 Korespondado (1 enskribo) 0.50 Frankoj
 Rabatoj: 3 enpresoj 10%^a; 12 enpresoj 25%^a

Direktoro: HECTOR HODLER — Redaktejo & Administrejo: 10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svisujo)

TEKSTO. — Nuntempajoj: *La desinfekto de la cerbo*, D-ro Alfred H. Fried. — **Socia vivo:** *Pri Litovujo*, Iv. H. Krestanoff. — *La japana virino*, Brieux. — *Falsado de antikvaĵoj*, W. Kampffert. — **Notoj.** — **Literaturo:** *Sinjorino Mac Williams kaj la fulmo*, Mark Twain. — **Esperantismo:** *Esperantismo kaj novaj ŝtatoj*, Ed. Privat. — *Esperanto-Kongresoj*. — *Kroniko*. — *Diversaĵoj*. —

Eventoj



La Kongresa Sezono en Esperantujo ne finiĝas post la fermo de UK, sed daŭras en aŭgusto kaj en septembro, do ankaŭ la oktobra *Ondo* enhavas plurajn raportojn pri esperantistaj kongresoj, renkontiĝoj kaj festivaloj, inkluzive de artikolo pri ĉi-jara IJK en Iberio (Grupfoto de Ariel Palmer).

IJK: Varmo, junuloj kaj Esperanto

Denove la IJK revenis al la situacio en kiu pli ol 300 homoj aliĝis, kvankam la kvanto de partoprenintoj ne superis 280. En la 74a Internacia Junulara Kongreso ĉeestis homoj de 42 landoj, ekde infanetoj ĝis emeritoj, sed ĉefe junaj aktivuloj.

La loko elektita estis Badajoz, hispania landlima urbo proksime al Lisbono, kie okazis la Universala Kongreso. Danke al tiu decido, multaj homoj el foraj landoj povis facile partopreni kaj en la UK kaj en la IJK (kelkaj eĉ en la Hispana Kongreso de Esperanto kaj en la ILEI-Kongreso, kiuj okazis en Madrido semajnon antaŭ la UK).

De la 4a ĝis la 11a de aŭgusto 2018 ni suferis varman ondon, kiu kaŭzis ke la tagon antaŭ la malfermo de la IJK la temperaturo atingis 47 gradojn. Bonŝance la varmeco ekmalaltiĝis dum la dua kongresa tago. Sed la kunorganizantoj el la Hispana Esperantista Junulara Societo kaj la Kataluna Esperanto-Junularo antaŭvidis tian veteron, kaj la kongresanoj povis ĝui naĝejon dum la tuta kongreso, eĉ nokte.

Nek okazis nek okazos IJK sen festumado. La juna etoso estas sinonimo kaj de ĝuo kaj de lernado. Tial la programo enhavis 146 aktivaĵojn. Bunteco estis celita kaj atingita; homoj lernis danci, turistumis, debatis kun politikaj partioj, malkovris projektojn Esperantajn en aliaj lokoj de la mondo, vizitis romiajn ruinojn... Tion eblis atingi nur per la helpo de la partoprenintoj.

Indas menciigi, ke dum la kongreso okazis trejnado pri egaleco, kadre de la





Erasmus+ projekto “Florigu Egalecon inter Junuloj”. La trejnatoj lernis kaj diskutis pri diversaj temoj, interalie, genra egaleco, kontraŭ diskriminacio, handicapuloj en nia movado, neperforta/egala komunikado, stereotipoj, egalrajtaj organizoj, antaŭjuĝoj pri genro kaj sekso, pluraneco kaj labormalegaleco.

Aldonaj rimarkindaj programeroj estis pluraj komitatasesioj de la komitato de TEJO, el kiu estis elektita nova estraro kun estraranoj el ĉiuj kontinentoj krom Oceanio.

Ni ne forgesas vesperan programon kiu dancigis ĉiujn. Koncertoj de la konataj Martin Wiese kaj Jonny M okazis kune kun koncerto de loka grupo *Cira kaj Ulises* kaj de la baldaŭa konata Esperanta muzikisto Timothy Gallego. Ankaŭ aliaj tipoj de aktivaĵoj kiel karaokeo kaj filma nokto estis en la vespera programo, inkluzive de la spektaklo de María Simões *Utopio* en kiu ni kolektis monon por la asocio HIMAYA kiu helpas rifuĝintojn en Eŭropo.

Ni profitis de la IJK por fortigi la movadon, tial ni kreis bonajn retojn kun lokaj kaj regionaj asocioj kaj institucioj. Sendube la plejparto de la lokanoj aŭdis pri ni, ĉar ni aperigis Esperanton en multaj lokaj kaj regionaj radioj, televido kaj gazetaro.

Grava atingo por la organiza teamo estis la apero en pluraj nacinivelaj amas-komunikiloj. Oni plurfoje rakontis pri Esperanto. Artikolo pri nia lingvo aperis en la plej vendata papera novaĵ-jurnalo, en alia populara nacinivela bitgazeto kaj en du radioelsendoj, unu el ili estas la dua plej aŭskultata radio en Hispanio.

Carlos Pesquera Alonso

Fotoj de Ariel Palmer

Infana-adoleskanta Kongreseto en 2018

UK okazis en Lisbono, kaj la Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK) okazis en Almada, trans la rivero Taĵo, en ĝia pitoreska junulgastejo, de kie oni povis vidi la grandan ponton kaj tutan Lisbonon. Nokte ne videblis miloj da steloj distancaj mil lum-jarojn, sed miloj da lumoj distancaj mil hom-metrojn.

La kvardeko da IIK-anoj, konsistis el 11 knabinoj kaj 22 knaboj, inter 5 kaj 16 jaroj, kaj 9 plenkreskuloj. Tiuj venis el 11 landoj el 3 kontinentoj. Bedaŭrinde, tro multaj venis el franclingvaj landoj, kaj tro multaj estis preskaŭ komencantoj, kio malfaciligis komunan agadon kaj komunikadon en Esperanto.

Dum la antaŭtagmezoj okazis paroligaj aktivaĵoj kiel kursoj. Kun la pli junaj infanoj Nicky uzis la kurson *Mazi en Gondolando*, faris ludojn por lerni vortojn kaj diversajn manlaborojn. Kun la malpli junaj infanoj Annie faris paroligajn ludojn kaj teatraĵon kun rekvizitoj. Kun la adoleskantoj Mónica kreis i.a. bildrakontojn.

Dum la posttagmezoj okazis ekskursoj. Lunde amfibia buso veturigis nin tra la urbo kaj poste sur la rivero Taĵo, poste ni piediris laŭ la rivero ĝis tropika botanika ĝardeno. Lunde ni vizitis spurojn de dinosaŭroj ĉe kabo Espichel kaj la plaĝon de la urbo Sesimbra, sed la akvo estis tro malvarma por povi longe baniĝi aŭ naĝi. Marde okazis ekstera serĉ-kur-memor-ludo kaj piedpilka ludo.



Foto: IIK-gvidanto



Foto: Iik-gvidanto

Merkrede ni ekskursis tuttage, kune kun kvardeko da UKanoj: Unue du malnovaj velboatoj veturigis nin sur la maron por serĉi kaj observi delfenojn, poste ni baniĝis sur la plej bela plaĝo Tróia. Trie ni vizitis rezervejon por observi akvobirdojn, sed pro la varmego vidis preskaŭ neniun birdon. Ĵaŭde ni observis la vivon sub la akvo, en la granda oceana akvario de Lisbono, tie antaŭ niaj admiraj vizaĝoj preternaĝis grandaj ŝarkoj kaj rajoj ĝis malgrandaj buntaj fiŝetoj de koralrifoj. Vendrede ni supreniris la turon Cristo Rei por observi la urbon Lisbono preskaŭ el la ĉielo.

Dum la vesperoj ni amuziĝis. Sabate okazis naskiĝtago de Samuel kaj ni devis “rompi la pinjaton”. En aliaj tagoj okazis tabloludoj en grupoj kaj ĵetludo por detruui kaj rekonstrui piramidon plej rapide. Gregory laŭtleĝis infanlibretojn. Merkrede Ankie kaj Nanne de *Kajto* plezurigis nin per siaj kantoj. Ĵaŭde okazis diskoteko, vendrede internacia vespero kun preparo de la Solena Fermo.

La sekva IIK 2019 okazos en la bela feriejo Lepola en ĉelaga arbaro proksime de Lahtio. Se vi ŝatus partopreni kiel infano, adoleskanto aŭ helpanto, skribu al infana.kongreseto@gmail.com aŭ vidu iam poste en la retejo <http://bertosch.free.fr/iik2019/>

Bert Schumann

Arkones sen Paweł

Estis malfacila periodo komence de la 1990aj jaroj, kiam en Pollando kaj en tuta orienta Eŭropo disfalis la antaŭaj strukturoj, kaj oni pene rekonstruis novajn. Esperanto iom lamis tiam, ĉar homoj devis unue zorgi pri si mem, sia laboro kaj ofte pri sia plua edukado. Tamen kelkaj homoj kuraĝe rekonstruis la Esperanto-agadon. Inter ili estis ankaŭ Paweł Janowczyk, kiu fervore engaĝiĝis pri la organizado de la renkontiĝo Arkones, Artaj Konfrontoj en Esperanto, en Poznano.

En januaro ĉi-jare Paweł mortis, 58-jaraĝa, multe tro juna, kaj oni revenis kun pezaj sentoj al Arkones, kiun li gvidis kaj formis dum dudeko da jaroj. En la sabata vespero okazis memora kunveno por li, kie amikoj kaj kunuloj kun danko rakontis pri lia vivo.

La vivo pluiras, ĉu oni volas halti aŭ ne. Arkones ĉi-jare estis ĉeforganizita de Tobiasz Kaźmierski, kiu kunorganizis ĝin dum multaj jaroj. Helpis aro da afabluloj, kiel ĉiujare. Post la memorigo de Paweł en la kadro de la tradicia Miela Vespero okazis festo por la 60a datreveno de Pola Esperanto-Junularo, fondita en 1958. Sekvis dancado, kiun bele vigligis jOmO el Tuluzo.

Prezentado de koncertoj kiel ĉiam estis grava ero de la ĉi-jara 34a Arkones. Ludis krom jOmO artistoj de A ĝis Z: Anjo Amika, Filino kaj Patro (Georgo Handzlik kun sia filino Dominika), Gijom' Armide, Koruso *Bel Canto* (el Poznano), *Pacon Kune*



La ĉefsalono de Arkones (Foto: Grażyvydas Jurgelevičius)

(korea kvaropo), Zuzanna Kornicka – kaj aldone laŭreatoj de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Vroclavo kaj eblis aŭskulti je “Kanzonoj por bona nokto”. Belega kaj granda oferto, kie preskaŭ ĉiu povis trovi sian ŝatatan muzikstilon.

Ankaŭ la prelega kaj kursa programo estis diversa kiel kutime – eblis viziti pli ol dudek kvin erojn. Estis sciencaj prelegoj (ekzemple, “Ĉu lingvo povas krei kulturon” aŭ “Esperanto kaj la merkata ŝtato”) kaj prezentoj pri Esperantujo (ekzemple, “Interna ideo kaj enmigra politiko” kaj ririgardo al la historio de Pola Esperanto-Junularo: “Kion ni heredis, kion ni povas lerni?”). Prezentiĝis la angla en nova perspektivo (“Ĉu kreola lingvo de konkeritoj?”), kaj okazis kvizo pri fotoj de famaj Esperanto-parolantoj. Eblis sekvi anatomian kurson pri la eterna temo “Amo” kaj specife la unua fazo, la enamiĝo. Oni povis ekscii multon pri la nova enciklopedio *Nia diligenta kolegaro*, kaj eblis lerni vitroteknikojn. Ridigis nin ankaŭ ĉi-jare la bele kolektitaj preskeraroj. Laŭdire bonas ankaŭ por la menso iom movi sian korpon ne nur per danco – sabate matene fervoruloj partoprenis en loka kurado kaj marŝado en Poznano, “Parkrun”.

Arkones estas internacia renkontiĝo en Pollando, kie kunvenas oriento kaj okcidento, nordo kaj sudo. Ĝi plu tenas sian tute specialan lokon kaj allogon inter la aranĝoj de Esperantujo.

Lu Wunsch-Rolshoven

UAM, la septembra sesio

La septembra sesio de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz signifis la komencon de la dua studjaro de la 7a interlingvistika grupo. Partoprenis ĝin dek gestudentoj el ok landoj: Brazilo, Ĉinio, Koreio, Germanio, Francio, Hispanio, Pollando kaj Ruslando.

Post plenumo de ekzamenoj sekvis kvar kursoj: la duan semestron de interlingvistiko gvidis, kiel kutime, Věra Barandovská-Frank, kontribuis al ĝi Ida Stria (eksstudentino de IS kiu doktoriĝis pri interlingvistika temo en 2016). Ŝi prelegis pri literaturaj kaj interretaj hobiaj lingvoj. Nicolau Dols (profesoro en la Universitato de Balearaj insuloj) instruis la konstruitan lingvon Toki Pona.

Enkondukon al ĝeneralaj leksikologio kaj semantiko gvidis Michael Farris el UAM kaj kontribuis Nicolau Dols. La dua semestro de Esperanta gramatiko okupiĝas pri sintakso, kiun prezentis ĉi-foje Marc Bavant (eksstudento de IS, d-ro kaj membro de la Akademio de Esperanto) kaj Ilona Koutny. La tria semestro de esperanta literaturo koncentriĝis al la tria (postmilita) periodo, ĝin prezentis István Ertl (redaktoro de *Beletra Almanako*).

Ĉeestis la semajnon ankaŭ Katalin Kováts, kiu taskita de ESF (Esperantic



Studies Foundation), intervjuis la studentojn kun la celo informiĝi pri iliaj spertoj kaj planoj kaj eventualaj bezonoj de financa subteno. Aldonendas, ke ESF pagas la studkotojn de ses studentoj kaj disponigas ankaŭ subvenciojn por vojaĝkostoj, kiuj el foraj landoj (aziaj kaj amerikaj), jes ja superhome ŝarĝas la studentojn. Se vi volas kontribui al tio, bonvolu donaci monon al tiu celo al ESF, kaj la fondaĵo duobligos la ricevitan sumon.

La septembran sesion fermas kutime la kultura festivalo ARKONES (organizita jam la 34an fojon ĉi-jare), dum kiu abundas prelegoj kaj krom ili la ĉeestantoj, venintaj ne nur el Pollando, sed ankaŭ el aliaj landoj, kiel Germanio, Litovio, Francio, Ukrainio, Ĉinio, Koreio, povis ĝui muzikajn kaj artajn prezentojn.

La programon de ARKONES multe riĉigis la kontribuajoj de la prelegantoj kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj (Nicolau Dols, István Ertl, Michael Farris, Ilona Koutny, Ida Stria, Katalin Kováts kaj Christophe Chazarein). La kortuŝa kaj altnivela koncerto de la koreoj realiĝis danke al la kontribuo de Unika (Jung Yuro), studentino de la IS.

Ilona Koutny
Katalin Kováts

Du eventoj en la kongresurbo 2019

Kvindeko da esperantistoj el Finnlando kaj kelkaj el aliaj landoj kunvenis meze de septembro en Lahtio, la urbo de la sekvontjara 104a Universala Kongreso. Ni havis rondveturadon kun lokaj ĉiĉeronoj kaj post tio ni konatiĝis kun la venontjara kongresejo.

La Trejnseminario okazis en feriejo je ĉ. dekkilometra distanco de la urbocentro, kaj tie la partoprenantoj lernis pri la ĝisnunaj preparoj. Sabatmatene en la programo estis dokumenta filmo pri la 110-jara historio de Lahti. Post la lunĉo ni havis kunsidon kun KKS Clay Magalhães, kiu aliĝis en la grupo tiam. Vespere en la feriejo ni daŭrigis la kongresajn preparojn en grupoj kaj havis konkludan kunsidon dimanĉmatene. Kaj kompreneble intertempe okazis manĝo- kaj kafopaŭzoj kaj ambaŭvespere saŭnumado, kiel kutime en finnaj renkontiĝoj.



Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Anonciĝis nova reta filmserio *Malsano nomita amo*, kiu estos parte parolata en Eo; ĝi estas kreaĵo de la reĝisoro Natalie MacMahon, kiu jam faris E-lingvan filmon *Universala amrakonto*. (Libera Folio)

La unua skolta E-domo en la mondo ekfunkciis en Simpang Ampat (Malajzio); rabatitan loĝadon en ĝi ĝuas E-skoltoj, e-istoj k skoltoj. (Eo en Azio kaj Oceanio)

1 sep 2018 en World Medical Journal, revuo de la monda medicina asocio WMA, aperis ampleksa anglalingva artikolo de d-ro Christoph Klawe pri Universala Medicina E-Asocio. (Landa Agado)

29 sep ekfunkciis ekspozicio pri Tibor Sekelj en la urba muzeo de la E-urbo Herzberg, en la Welf-kastelo; ĝin organizis Interkultura Centro Herzberg kun subteno de ESF okaze de la 30a mortodatreveno de Sekelj. (ICH)

La Aragona E-grupo *Frateco* je la Eŭropa Tago de Lingvoj organizis prelegon k praktikan studrondon “Eo kiel helpa lingvo por faciligi la internacian komunikadon” en Zaragoza. (La Bitbulteno)

Madrida E-Liceo partoprenis la Foiron pri Socia Ekonomio, kiu okazis 22-23 sep en la kulturcentro Casa del Reloj. (La Bitbulteno)

En septembro ĉe Universitato Zaozhuang (Ĉinio) malfermiĝis E-fako kun 25 studentoj, kiuj lernos Eon dum kvar jaroj; en la unua semestro Eon instruas d-ro Maciej Stanisław Zięba el Pollando k prof. Sato Ryusuke el Japanio. (Universitato)

Komenciĝis aliĝado al la lingvaj kursoj ĉe Nacia Universitato pri Neĉeesta Edukado (UNED, Hispanio), inter kiuj, kiel granda novaĵo, estas kurso de Eo. (La Bitbulteno)

La Elekta Komisiono de UEA proponis, ke Bruĉjo Kasini k Renato Corsetti estu elektitaj al la Komisiono pri Financo anstataŭ du antaŭaj anoj (Huang Yinbao k Fernando Maia), kiuj intertempe fariĝis estraranoj. (Komitato-de-UEA)

La estraro de ILEI jene dividis la estrarajn taskojn – prezidanto: Mireille Grosjean (kunordigo de la laboro de la estraro, respondeculo pri eksteraj rilatoj, respondeculo pri informado pri la Ligo, observanto de ILEI en la estraro de UEA k komitatano A ĉe UEA, sekvo k observado de la du revuoj de ILEI), vicprezidanto: Ivan Colling (eldonado de la Manlibro pri Instruado de Eo), sekretario: Elena Nadikova, vicsekretario: Yuro Jung (reta komunikado, asistanto pri kongresaj aferoj, observanto de ILEI ĉe TEJO), respondeculo pri financaj aferoj: William Harris, vicprizorganto de financaj aferoj: Karine Arakeljan, estrarano pri kongresoj: Radojica Petrović. (LIEI)

La sudafrika e-isto Byelongo Elisée Isheloke doktoriĝis ĉe Durbana Teknologia Universitato per la tezo “Esplorante la rezultojn de BRICS partnerado pri erca transformiĝo en Sud-Afriko”; 10 paĝoj en la 318-paĝa teksto estas dediĉitaj al Eo. (Landa Agado)


Komenciĝis translokado de la Centra Oficejo de Esperanto-USA el Kalifornio al la hejmo de la direktoro de EUSA Vilĉjo Harris en Majno; tio ŝparos ĉ. \$30,000 jare. (Usona E-isto)

Tribuno



Kial la plej granda greka insulo Kreto, la naskiĝinsulo de Zeŭso kaj paradizo por turistoj, ne allogas junajn esperantistojn, malgraŭ la tre favoraj kondiĉoj, kiujn proponas Annie Grente? Legu ŝian artikolon (p. 41).

Kiom da delegitoj?..



Post la katastrofe erarplena *Jarlibro 2017*, pretigita de volontulino, UEA komisiis la redaktadon de *Jarlibro 2018* al Paŭlo Fischer-Kotowski, kiu redaktis ĝin antaŭ du jaroj, ankoraŭ kiel oficisto en Roterdamo. Li sukcese plenumis la taskon ankaŭ en Varsovio, kaj la nuna *Jarlibro* revenis al la iama digna nivelo, kio gravas, ĉar ĝi probable estos la lasta ero en la pli ol centjara serio.

Ĉi-jara *Jarlibro* enhavas 1296 adresojn de la diverskategoriaj delegitoj de UEA en 100 landoj. Unuavide tio ŝajnas granda nombro, tamen la Delegita Reto malkreskas: antaŭ 25 jaroj, sojle de la interreta epoko, funkciis 2272 delegitoj, preskaŭ duoble pli ol nun.

La supro de la landlisto apenaŭ ŝanĝiĝis. Same kiel en 1993 plej multaj delegitoj de UEA loĝas en Brazilo, sed ilia nombro nun estas nur duono de tiu antaŭ 25 jaroj.

2018		1993	
Brazilo	142	Brazilo	284
Germanio	113	Germanio	206
Francio	84	Francio	190
Japanio	60	Usono	119
Usono	56	Japanio	105
Ĉinio	39	Italio	102
Italio	39	Britio	101
Hungario	32	Nederlando	79
Nederlando	29	Svedio	78
Ruslando	28	Hungario	62

Kvankam preskaŭ en ĉiu lando la delegitoj malmultiĝas, en la teritorio de eks-USSR ĝi restis preskaŭ la sama: 86 delegitoj en 1993 (Ruslando 38, Ukrainio 15, Latvio 12, Estonio 8, Belorusio kaj Litovio po 4, Uzbekistano 2, Azerbajĝano, Kartvelio, Taĝikistano po 1) kaj 82 delegitoj nun (Ruslando 28, Ukrainio 20, Estonio 9, Latvio 8, Litovio 5, Armenio 4, Kazaĥstano 3, Belorusio 2, Kartvelio 1, Taĝikistano 1, Uzbekistano 1). Atentindas minus dek en Ruslando kaj plus kvin en Ukrainio.

Same kiel antaŭ kvarona jarcento Brazilo tenas la unuan lokon ankaŭ en la listo de la urboj kun delegitoj (la ĉefdelegitoj ne estas enkalkulitaj); tamen antaŭ 25 jaroj en la tri listosupraĵaj urboj estis ĝuste 100 delegitoj, kaj nun en la tri plej delegitozaj urboj estas nur 34 delegitoj, kaj la amazonan urbegon Manauso, en kiu iam loĝis pli ol 50 delegitoj, nun en la Delegita Reto reprezentas nur tri esperantistoj.

Estas interese, ke en la unua urbonaŭo estas neniu urbo de Eŭropo, Berlino kaj Budapeŝto dividas kun Seulo la dekan lokon.

2018		1993	
Rio-de-Ĵanejro (Brazilo)	12	Manauso (Brazilo)	52
San-Paŭlo (Brazilo)	12	Rio-de-Ĵaneiro	24
Brazilio (Brazilo)	10	San-Paŭlo	24
Havano (Kubo)	10	Budapeŝto (Hungario)	21
Multano (Pakistano)	10	Brazilio	17
Tokio (Japanio)	10	Tokio	14
Tehrano (Irano)	9	Seulo (Koreio)	14
Hanojo (Vjetnamio)	8	Sofio (Bulgario)	12
Katmanduo (Nepalo)	8	Lomeo (Togolando)	10
Berlino, Budapeŝto, Seulo	7	Tehrano	10

Ĉar pro la nuna reformado de UEA en la estonteco la *Jarlibro* apenaŭ aperos libroforme, mi verŝajne ne plu havos fonton por mia statistikado, kiun mi faris de tempo al tempo komence en *Ruslanda Esperantisto* kaj poste en *La Ondo de Esperanto*.

Aleksander Korĵenkov

“Lokalizu”: Nova projekto de MEA MASI

“Lokalizu” estas projekto por tradukado de fakaj tekstoj kun Esperanto kiel pontolingvo. Ĝi ne similas ekzistantajn aŭ iam ekzistintajn projektojn. Ne temas pri maŝina tradukado. Ne temas pri volontula tempopasigo. Ne temas pri senpaga malŝparo de tradukkapabloj kaj tempo. Temas pri serioza entrepreno kun profesiaj tradukistoj, kiu ebligos por mendantoj kontraŭ modera pago ricevi bonkvalitajn tradukojn al kelkaj plej necesaj lingvoj, kaj por esperantistoj – ricevi monon pro sia traduklaborado.

La 10an de septembro en Moskvon venis la ĉina esperantisto kaj entreprenisto Zhang Long, konata en Esperantujo kiel Urso. Li tre interesiĝis pri la projekto “Lokalizu”. Pro tio en la traduk-oficejo “Lingvokonekt”, gvidata de esperantistoj, okazis kunveno de “Lokalizu”, kiun partoprenis 11 homoj, kvin el ili rete. Ĝi estis la dua kunveno, dum kiu interesatoj diskutis la projekton, eldiris siajn opiniojn kaj planojn pri ĝi, interŝanĝis novaĵojn kaj rakontis, kiu faris kion por progresigi la projekton.



Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Atendante la trian Junularan Renkontiĝon en Kreto...

La subtitolo de ĉi tiu artikolo povus esti: “La unua kaj la dua renkontiĝoj, ĉu fiaskoj?”. Tiel mia rakonto temos pri ideo (ĉu bona?), kiu venis al mia kapo komence de 2017. Tiam finiĝis la renovigo de mia domo en la urbo Neapoli sur la greka insulo Kreto. Mi aĉetis ĉi tiun domon kun du loĝejoj en 2015, kaj mi intencis gastigi esperantistojn en ĝi. Mi registriĝis en Pasporta Servo kaj atendis, atendis...

Mi kutimas dum vojaĝoj loĝi en amasloĝejoj por junuloj... (Mi estas juna 60 jarulo!). Venis la ideo organizi ion, por ke junuloj, kiuj eklernis Esperanton sole (ekzemple, per Duolingo) havu eblecon kune praktiki la lingvon. Por ke ili devu uzi Esperanton kaj ne krokodilu, ili havu malsamajn gepatrajn lingvojn... Mi aĉetis 12 faldlitojn. Mi anoncis mian projekton kaj elektis la paskajn feriojn en 2017, kiam la romkatolika, ortodoksa kaj la juda paskoj okazis samtempe. Printempo estas bela ĉie, kaj en Kreto la vetero estas sufiĉe milda por naĝi en la maro, promeni ktp. Pluraj kontaktis min, sed neniu decidis veni al mia domo tiam... Do, mi ŝanĝis la datojn, oni diris al mi: jes, junuloj havas pli da tempo dum la somero...

La Unua Junulara Renkontiĝo en Kreto okazis la 18-28an de aŭgusto 2017 kun... nur du homoj... Tamen ili ne havis saman gepatran lingvon, ĉar ili estis komencantoj el Svedio kaj Hungario. Ni multe ekskursis per aŭto, promenis, naĝis, babilis. Ili estis tre kontentaj kaj promesis trovi alian partoprenonton (almenaŭ po unu) en siaj landoj.

Kiam 2018 komenciĝis, mi denove provis varbi junulojn. El Svedio, el Hungario, neniu nova esperantisto... Sperta esperantisto el Hungario skribs ke li certe venos. Mi provis anonci en diversaj grupoj de Facebook, mi kreis eventon, nenio... Mi kontaktis turkan amikon kaj petis helpon. Li menciis du entuziasmajn turkajn junulojn. Mi invitis ilin, por ke ili ricevu vizon, mi helpis per transporto kaj, finfine, la Dua Junulara Renkontiĝo okazis la 19-29an de aŭgusto kun... nur du junuloj kaj unu sperta esperantisto. La junuloj estis komencantoj, ni multe ekskursis (mia aŭto sufiĉis por preni ĉiujn), sed ili ne havis malsaman gepatran lingvon...

La demando estas: kial mi ne sukcesis? Kial ne venis pli da junuloj? Mi petis malmulte da mono: nur kvin eŭrojn tage por ekskursi kaj manĝi ktp. Ĉu junuloj ne povas decidi sufiĉe frue por trovi malmultekostajn flugojn? Ĉu mi povus informi pli multajn homojn?... Kiel?...

Mi ankoraŭ ne rezignis kaj esperas gastigi junulojn fine de aŭgusto 2019. Inter-tempe mi instruas Esperanton al miaj amikinoj, avinoj de la urbeto, tri grekaj, unu rusa, unu brita (kaj mi, franca). Sufiĉe internacia grupo ĉu ne?... Kaj sufiĉe juna!


Annie Grente

anniegrente@hotmail.fr

La jarabono por 2019 kostas nur 15 eŭrojn

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Antaŭ 80 jaroj, la 3an de oktobro 1938 pro partopreno en la spiona organizaĵo Unia Centro estis mortkondamnita kaj samtage mortpafita Vladimir Valentinoviĉ Varankin (1902-1938), aŭtoro de la legenda (kaj leg-enda) romano *Metropoliteno* (1933), kiu estas konsiderata kiel unu el la plej grandaj atingoj de la Esperanta literaturo. Vidu en la sekva paĝo la liston de la oktobraj datrevenoj.

Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2018

3. Antaŭ 80 jaroj estis ekzekutita **Vladimir Valentinoviĉ Varankin** (1902-1918-1938), rusa sovetunia pedagogo, membro de la Lingva Komitato (1930-34), aŭtoro de la populara romano *Metropolitano* (1933, angle 1979, ruse 2008). [Legu pli en NDK, p. 291-293.]

4. Antaŭ 80 jaroj estis ekzekutita **Nikolaj Vladimiroviĉ Nekrasov** (1900-1915-1938), rusa sovetunia ĵurnalisto, membro de la Lingva Komitato (1929-38), kunfondinto (1922) kaj redaktoro de *La Nova Epoko* (ekde oktobro 1923 Literatur-Scienca aldono de *Senacieca Revuo*), poeto kaj tradukanto, i.a., de *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin (1931).

5. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Kejla Senderovna (Klara Aleksandrovna) Zamenhof** (nask: Zilbernik, 1863-1887-1921), edzino de Lazarj Markoviĉ Zamenhof.

6. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Michel Duc Goninaz** (1933-1946-2016), franca filologo, E-instruisto kaj vortaristo, reviziinto de la novaj eldonoj de PIV (2002, 2005), membro de la Akademio de Eo (1976-2016) kaj direktoro de la Akademia sekcio Gramatiko (1983-92), aŭtoro kaj tradukinto de pluraj verkoj (*La fremdulo* de Camus, 1993; *Sonĝonovelo* de Schnitzler, 1997; *Kun diablo en la korpo* de Radiguet, 2006), laŭreato de la titolo "La Esperantisto de la Jaro 2002". [Legu pli en NDK, p. 79-80.]

15. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Egidius "Luuk" Wensing** (1913-1930-2004), nederlanda entreprenisto, direktoro de unu el la tri sekcioj de *Philips*, disvastiganto de Eo en komerco, kunfondinto de Instituto por Eo en Komerco kaj Industrio (1963), vicprezidanto de UEA (1962-72), la unua prezidanto de Institucio Hodler 68 (1968-72, (kun)aŭtoro kaj tradukinto de kelkaj E-libroj. [Legu pli en NDK, p. 299-300].

16. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Božidar Popović** (1913-1932-1993), elstara serba astronomo, direktoro de E-Instituto en Sarajevo (1958-62) kaj de Jugoslavia E-Instituto (1962-65), prezidanto de Jugoslavia E-Ligo (1969-79), vicprezidanto de UEA (1973-74), ĝenerala sekretario (1954-71) kaj prezidanto (1971-77) de ISAE, redaktoro de *Scienca Revuo* (1961-77), aŭtoro de kelkaj libroj pri Eo, honora membro de UEA (1977). [Legu pli en NDK, p. 232-233].

19. Antaŭ 10 jaroj forpasis **Bernard Golden** (1925-1945-2008), usona kaj hungaria arkeologo kaj muzeologo, aŭtoro de kvar originalaj novelaroj, tri prilingvaj libroj, unu kolekto de unuaktaĵoj kaj pli ol 3 mil artikoloj en Eo, 16-foja laŭreato de la Belartaj Konkursoj de UEA, membro de la Akademio de Eo (1983-2001) kaj direktoro de la Akademia sekcio Ĝenerala Vortaro (1984-98). [Legu pli en NDK, p. 104-105].

23. Antaŭ 85 jaroj forpasis **Ivan Gennadjeviĉ Ŝirjaev** (1877-1895-1933), rusortodoksa pastro, aŭtoro de kelkaj prozaj E-libroj, inkluzive de *Sen titolo*, kiun kelkaj taksas la plej frua originala E-romano, "iniciatinto-ĉefredaktoro" de *Enciklopedio de Eo* (1934). [Legu pli en NDK, p. 277-278].

Aleksander Korjenkov

Bibliografio de Aleksander Korĵenkov (4)

En la kvara parto de la bibliografio de Aleksander Korĵenkov estas listigitaj liaj verkoj aperintaj en *Budapeŝta Informilo*, *Esperanto* (UEA), *Heroldo de Esperanto*, *Hungara Vivo*, *Informilo por Interlingvistoj*, *Internacia Ĵurnalisto* kaj *Literatura Foiro*. Ĉar en BibLo (Biblioteko de *La Ondo*) mankas pluraj Esperanto-gazetoj, en kiuj multaj liaj artikoloj estis publikigitaj, ĉi tiu bibliografio ne estas plena.

Budapeŝta Informilo

OrSEJT-24 // Budapeŝta Informilo, 1982, №10.

Konferenco pri planlingvoj ĉe Uralo // Budapeŝta Informilo, 1983, №8. – [UKP-1].

REVU-24 // Budapeŝta Informilo, 1984, №1.

Heroa ŝoforo / Tr. el la rusa // Budapeŝta Informilo, 1984, №6-7. – [Humuraĵo el “Roga i kopyta”].

URA-6: Historiaj aspektoj // Budapeŝta Informilo, 1984, №6-7.

Uralaj informoj // Budapeŝta Informilo, 1984, №11. – [UKP-2 kaj LS en Tjumeno].

Tago de la Libro en Sverdlovsk // Budapeŝta Informilo, 1985, №2.

La 7a UER en Tjumeno // Budapeŝta Informilo, 1985, №9.

Internacia lingvo kaj sciencfkcio // Budapeŝta Informilo, 1986, №4. – [Esperanto en “Uraljskij Sledopyt”].

Denove en Permo // Budapeŝta Informilo, 1986, №5. – [UKP-4].

Opinioj de niaj legantoj // Budapeŝta Informilo, 1986, №6. – [Letero de leganto].

Oktaga semajno // Budapeŝta Informilo, 1986, №12. – [4a E-Semajno en Sverdlovsk].

Siberia semajnfino // Budapeŝta Informilo, 1987, №3. – [LS en Tomsk].

Entute: 13 tekstoj. Nekompleta listo.

Esperanto

Iom pri K.E. B. // Esperanto, 1987, №6.

Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro // Esperanto, 1994, №6.

Realaj valoroj de esperantisteco // Esperanto, 1995, №3.

Laste statistikis // Esperanto, 1997, №4. – [Fragmentoj el la artikolo pri la E-libro-produktado en 1996].

Falo aŭ stabileco // Esperanto, 1997, №6. – [Pri la membrostatistiko de UEA].

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>


Kulturo



La prezentadon de NDK (vd. p. 54) en Poznano sekvis kvizo, post kiu István Ertl ricevis de Halina Gorecka ekzempleron de la enciklopedio kiel premion pro la venko en la kvizo. (Foto: Mirośława Kubicka)

RINGEGO

Rakonto de Fjodor Sologub



I.

Sur malplena matena urboranda strato iris sinjorino kaj kvarjara knabo. La juna, belvestita sinjorino feliĉe ridetis kaj zorgeme rigardis al sia filo, gaja kaj ruĝvanga knabo. La knabo rulis antaŭ si ringegon, – grandan, novan, helflavan. La knabo ankoraŭ nelerte puŝetis tiun ringegon, ĝoje ridis, trotetis per siaj pufaj nudgenuaj gambetoj kaj svingis bastoneton. Eble superfluis levi la bastoneton tiom alte super la kapo, – sed ja alie ne eblis!

Kia ĝojo! Pli frue ĉi ringego ne estis, kaj jen ĝi kuras tiom vigle! Kaj ĉio tiom gajas!

Pli frue ĉio ĉi ne ekzistis por la knabo, ĉio novis – kaj la matenaj stratoj, kaj la gaja suno, kaj la foraj urbobruoj. Por la knabo ĉio estis nova, pura kaj gaja.

Jes, ĉio estis pura: la infanoj mem ne vidas la malpuron en objektoj, ĝis ilin atentigos plenkreskuloj.

II.

Povre vestita maljunulo kun krudaj manoj haltis ĉe la stratkruciĝo. Li premiĝis al la barilo kaj lasis preteriri la sinjorinon kun la knabo. La maljunulo per siaj senbrilaj okuloj rigardis la knabon kaj stulte rikanis. Neklaraj, malrapidaj pensoj rampis en lia kalva kapo.

– Sinjorido, – li pensis, – infaneto. Jen kiel ridegas! Infaneto, tamen infaneto de sinjoro, – jen kiel!

Li ne komprenis ion, io ŝajnis stranga al li.

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



La enciklopedia okopo: Povilas Jegorovas, Barbara Pietrzak, Roman Dobrzyński, Anjo Amika, István Ertl, Ilona Koutny, Jean-Marc Leclercq (JoMo), Katalin Kováts (Foto: Ulrich Matthias)

Prezentado de NDK en Poznano

La 22an de septembro en Poznano kadre de la 34aj Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES) Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov prezentis sian enciklopediecan verkon *Nia diligenta kolegaro* (NDK). Meze de la prezentado sur la podion estis invititaj ok ĉeestantaj personoj, pri kiuj estas apartaj artikoloj en la enciklopedio. La eminentuloj ricevis multajn aplaŭdojn de la publiko, pleniginta la Arkonesan ĉefsalonon “Spegulejo”. La kunaŭtoroj post sia rakonto respondis demandojn. Pluraj ĉeestantoj profitis la eblon favorpreze aĉeti la verkon kaj ricevis aŭtografojn ne nur de la kunaŭtoroj sed ankaŭ de la ok enciklopedianoj.

Poste en “Spegulejo” okazis la kvizo *Kiu estas sur la ekrano?*, en kiu oni devis identigi surekranajn portretojn de pli ol kvardek famaj esperantistoj (ĉiuj el NDK). Senescepte ĉiuj vizaĝoj, eĉ kelkaj ege malfacile rekoneblaj, estis rapide kaj ĝuste nomitaj. La kvizon, gviditan de la kunaŭtoroj de NDK kaj Russ Williams, gajnis István Ertl, kiu ricevis ekzempleron de la enciklopedio kiel la ĉefpremion.

Ĝi estis la kvara prezentado de NDK, kiu jam estis prezentita en Vilno (aprilo), Liptovský Mikuláš kaj Budapeŝt (ambaŭ en julio). La kvina kaj la lasta prezentado okazos la 15an de decembro kadre de la Zamenhoffesto en Berlino.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

Kolekti, konservi kaj disponigi – vera defio por la Esperanto-komunumo

Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon / Kompilis Katarína Novotníčková. – Partizánske: Espero, 2015. – 174 p., il.



La seminarioj kaj konferencoj pri aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko komenciĝis en Slovakio en 1978 kaj estis alterne organizataj en la nunaj Ĉeĥio kaj Slovakio. En 2010 la organizadon de KAEST transprenis I@E (junulara neregistara organizaĵo Edukado@Interreto), kiu jam okazigis kvar konferencojn en la Slovakia urbo Modra-Harmónia en la parnombraj jaroj.

La konferenca temo en 2014 estis “Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon”, temo grava por Esperanto en ĝia tuta historio kaj precipe aktuala en la nuna cifereciĝanta mondo. Kio okaz(as)os al la arkivoj kaj kolektoj de esperantistoj post ilia forpaso? Ĉu ili putros en subtegmentejoj kaj keloj, estos forĵetitaj al rubaĵujo fare de parencoj, aŭ konserviĝos en iu institucio? Ĉu vi iam pensis pri tio, se vi havas konsiderindan libro- aŭ gazet-kolekton, fotojn kaj dokumentojn? Mi, jes. Des pli, ke la temo de bibliotekoj kaj arkivoj estas tre proksima al mi ekde mia esperantistiĝo kaj esploroj pri la historio de Esperanto-movado. Cetere, pri la eventuala sorto de via kolekto vi povas sciigi per amuza sed reala skemo de Jan Uldal Niemann librofine.

Mi revenas al la artikolkolekto. Unue pri la aspekto kaj aranĝo de la libro: en ĝi estas tro malgrandaj marĝenoj enaj kaj eksteraj, kaj, almenaŭ por mi, tro malgranda litertipo uzita. Ĉe tio finiĝas miaj negativaj rimarkigoj.

Same kiel la konferenca programo, la libro estas dividita je sekcioj. La sekcio A entenas la ĉeftemajn prelegojn, inter kiuj mi unuavice mencias la kontribuojn de Detlev Blanke “En Germanio: Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj sub ŝtata protekto”, en kiu li resumas la ĝistiamajn diskutojn pri la planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj, donas kelkajn kriteriojn, kiel priskribi kolektojn, kaj listigas kaj karakterizas la kolektojn en Germanio, ankaŭ la du gravajn personajn kolektojn, tiujn de la familioj Hauptenthal kaj Blanke.

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.


Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Novelaro de Brjusov - nova senpaga libro de *Sezonoj*

Valerij Brjusov

Kvar noveloj



Antaŭ 19 jaroj la Ruslanda eldonejo *Sezonoj* (tiam en Jekaterinburgo, nun en Kaliningrado) eldonis 500 ekzemplerojn de *Kvar noveloj* de la rusa literaturisto Valerij Brjusov. Ĉar ĉi tiu kolekto, tradukita de Grigorij Arosev, Ilisia Novikova kaj Aleksander Korĵenkov, delonge elĉerpiĝis, *Sezonoj* decidis reeldoni ĝin en la serio “Virtuala biblioteko de *Sezonoj*” kiel senpagan bitlibron laŭ la normoj epub kaj pdf. Ĝi estis enretigita la 15an de septembro 2018.

Kvar noveloj estas la 18a libro en la bitlibra kolekto de *Sezonoj* (16 libroj estas senpage elŝuteblaj, du libroj estas aĉeteblaj). Krom libroj en la kiosko estas ankaŭ kelkaj senpage elŝuteblaj numeroj de *La Ondo de Esperanto*.

Elŝutu la novelaron de Valerij Brjusov kaj la aliajn librojn de *Sezonoj* ĉe:

<http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

Literatura Foiro, 2018, №294

Tre akurata kaj aktuala estas la numero 294 (aŭgusto 2018) de *Literatura Foiro*, la plej kompleta kultura revuo en esperanto, marŝanta al sia kvindeka jarkolekto senpaŭze, absoluta rekordo en la historio de la esperanta popolo.

La serio de kovriloj dediĉita al la mondliteraturaj ĉefverkoj plej influaj por nia kulturo proponas ĉi-numere la du tradukojn de *Hamleto*, fare de Zamenhof kaj Newell, kun elstara eseo de prof. d-ro Humphrey Tonkin, verŝajne nia plej eminenta ŝekspirologo post la morto de Reto Rossetti.

Bonegan eseon pri la ido-literaturo kompletigas Gonçalo Neves, interalie kun originalaj kaj raraj fotoj, kiuj kontribuas al la prestiĝo ankaŭ grafika de la revuo.

Roza (aŭ viola) koloro karakterizas pli ol kutime, pro feminaj paĝoj de Marie-France Conde Rey (pri Simone Veil), de Roberta Marasco (pri la taktiko de la kulposentoj), de Nina George (pri hatmesaĝoj al verkistinoj), de Renée Triolle (pri filmo por instrui laikecon) kaj de FEM pri la subita forpaso de Oksana Ŝaĉko. Neniu periodaĵo en Esperantio superas LF-on per la graveco de virinoj.

Diversaj kontribuoj riĉigas la numeron rilate beletron: rakontoj de Ivaniĉka Maĝarova kaj Henri de Meeûs; poemoj de Mao Zifu, Karmenu Vassallo kaj Mikaelo Bronŝtejn; teatra eseo pri Samuel Beckett de Giorgio Silfer; filozofumado de Vinko Oŝlak; kultura itinero fare de Carmel Mallia.

Recenzojn proponas Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, ĉi-lastaj per ampleksa kritika prezento pri la disertaĵo de Irene Caligaris.

HeKo

Mozaiko

1a Jaro	Aprilo 1911	1a No.
---------	-------------	--------



Moderna Humoro

Monata ilustrita gazeto

Humoro, Ŝerco, Satiro kaj Arto

en

Esperanto

Abonprezo: M.-2.40. Sm.-120. fr. 3.00.

Unu numero kostas 20 Pf. 10 Sd. 25 Cfs.




La lunon ne ĝenas se la hundo
ĝin albojas.

Redaktoro kaj Eldonanto: Fritz Stephan, Leipzig, Windmühlenweg 1a.

En aprilo 1911 en Lepsiko aperis la unua numero de *Moderna Humoro* kun la subtitolo “Monata ilustrita gazeto por Humoro, Ŝerco, Satiro kaj Arto en Esperanto”. Ĝin redaktis kaj eldonis Fritz Stephan. Laŭ la Bitoteko de HEF, kie ni elŝutis ĝin, ĝi estis la sola numero <http://esperanto.es:8080/xmlui/handle/11013/1995>. Konatiĝu kun kelkaj ŝercoj el ĝi en p. 63.

Krucvorttenigmo



1. Eŭropa princlando kun senimposta leĝaro; 2. Dia monto en Grekio; 3. Simbiozo de fungo kaj algo; 4. Stelo en la konstelacio Cigno; 5. Floro de longviveco ĉe la antikvaj grekoj; 6. Aborigenoj de Nov-Zelando; 7. Funebra vazo ĉe egiptoj; 8. Ĉefprofesoro de fakultato; 9. = Krakad'; 10. Kreskaĵo, el kies folioj estas farita krono de Melpomeno; 11. = Akvopulo; 12. = Nazkataro; 13. = Akraĵo; 14. Vinbera suker'; 15. Vintra manĝaĵo de urogalo; 16. Fina part' de arta verko; 17. Fiŝo, vivanta en malsala akvo, kies karno laŭ kvanto de albumeno superas kokaĵon; 18. Rezentantoj de ĉi tiu nacio kutimas trinki teon je la 17a horo. 19. Flugo, kiu similas al falo; 20. Kapsulo kun raŭpo.

Bonvolu sendi viajn respondojn al nia redakcia adreso antaŭ la 25a de oktobro 2018.

Kompilis **Viktor Alikin**

La jarabono por 2019 kostas nur 15 eŭrojn

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Germanaj ŝercoj el la 1911a jaro

Terura infano

Patro volis klarigi al sia fileto la ruĝe signitajn tagojn sur la murkalendaro kaj lin demandis: “Ĉu vi scias, kara infano, kion signifas la ruĝe signitaj tagoj?” “Jes, kara paĉjo, mi tion scias: ili signifas vian libertempon, kiam vi – laŭ la permeso de la patrino – povas iri gastejon kaj tie restadi ĝis la 10a vespere”.

Demando

A: “Kio estas la edzeco?”

B: “Ĝi estas malliberejo por korŝtelisto.”

Ĉe la kajo

Fraŭlino: Ĉu daŭros ankoraŭ longtempe ĝis alvenos la vagonaro de Berlino?

Staciestro: Ne zorgu fraŭlino, vi ja estas ankoraŭ juna!

En la lernejo

Instruisto klarigis al la infanoj la sencon de la vorto “dezerto”. “Vi vidas, infanoj”, li parolis, “dezerto estas granda regiono, sur kiu nenio kreskas – Müller, mi kredas, vi ne atentis!” – “Do, sinjoro instruisto!” – “Nu, ĉu vi scias, kio estas dezerto?” – “Jes, sinjoro instruisto, dezerto estas regiono sur kiu nenio kreskas.” – “Ĝuste, nun nomu al mi ekzemple dezerton!” – “Via kapo, sinjoro instruisto!”

Terura infano (2)

Onklo: “Vi estas tre bona, malgranda knabino, ke vi instigas min manĝi ankoraŭ teleron da supo! Kial vi volas tion?”

Nevino: “Por ke vi ne manĝu tiel multe de la kokinrostaĵo, kiel la lastan fojon!”

El *Moderna Humoro*, 1911, №1.



Dr. L. L. Zamenhof,
la aŭtoro de Esperanto.

Jnter Esperantistoj.

A.: Kial nia kara majstro aspektas tiel feliĉe?

B.: Ĉar li ĝojas pri la apero de „Moderna Humoro”

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Hunde muta programaro

Ŝanĝoj en la programaro uzata por la pretigo enkondukis “bonigojn”, kiuj nete maljelpas... (Stefan MacGill: Estrara Komunikado EKO 2018-21, 11 sep 2018; rimarkis Valentin Melnikov)

Ĉu kandidato Mi-cela?

Tiuj ne estas personaj atakoj, sed sobraj pritakoj pri la labormaniero de Liphari, utilaj por kompreni kiel kandidato alirus la laboron, se elektita. (Francesco Maurelli, listo uea-membroj, 11 aŭg 2018)

Oficestro imunigis oficiston

... la malsaniĝo de la eliranta Ĝenerala Direktoro... malhelpis la transdonon de sperto kaj konoj, kaj la postan malsaniĝon de alia kerna oficisto... (Mark Fettes: Mi restos aktiva en la movado // *La Ondo de Esperanto*, 2018, N°8-9, p. 16)

Komunika geometrio

La lingvoj... estas la vektoro ebliganta tiun dialogon... (Mesaĝo de s-ino Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de Unesko, okaze de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto, Lisbono, la 29-an de julio 2018 // *Esperanto*, 2018, N°10, p. 197)

El sinoj verda kaj muzika, aŭ: La homo kun tri ge(j)patroj

Jean-Manu estas filo de esperantistoj kaj gitaristo (Protokolo de la 70a SAT-Amikara Kongreso en Parizo // *La Sago*, 2018, N°5-6, p. 6; trovis Ionel Oneț)

Aŭtozativo

De kie eliras la aŭtobuson? (Pedro M. Martín Burutxaga: Guia de conversa català-esperanto. Kataluna E-Asocio, 2016, p. 29)

Sendu akuzativon!

Helpu esperantisto el Afriko (<https://www.vakinha.com.br/vaquinha/helpu-al-esperantisto-el-afriko>)

Akuzativo sendita, sed hungara

Baghy, Julio: Sur sanga terot. 1933 (<https://www.getit01.com/p2018020133175007>)

Reta incendio

Matthias, Ulrich: Fajron sentas mi internet. 1990 (<https://www.getit01.com/p2018020133175007>)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzner, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: libroj@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hiperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-USA, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko

EVOLUO DE PARADIGMOJ EN SCIENCO KAJ TEKNIKO



Venu ankaŭ vi
ĝui sciencon en Esperanto!

<http://kaest.ikso.net>



18.-21.10.2018, Modra-Harmónia (Slovakio)